# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 06/05/2021 Kvincentdudeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au


## Entute 814,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **283,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **235,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **212,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **84,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).


THE ESPERANTO TEACHER

N.ro 33 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Ankaŭ adjektoj havas sian kernvorton. Se la adjekto estas prepozitivo, la kernvorto estas la prepozicio. Jen frazon kun 5 adjektoj:

"Mi sendis bukedon (1) hieraŭ (2) al mia fratino (3) tre rapide (4) por ŝia naskiĝtago (5) per rapida transportservo."

Kiuj estas la kernvortoj en la kvin adjektoj?

2). Kiom da adjektoj povas troviĝi en frazo?

3). Krom verbon, la predikato povas enhavi predikativon. Ĝi plej ofte estas substantivo aŭ adjektivo. Jen du ekzemploj: A. "Ili elektis mian amikon PROFESORO PRI FILOZOFIO". B. "Ni trovis tiun poemon TRE ĈARMA".

Ĉu predikativo ricevas la finaĵon "-n" ?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 529. *Marcel Leereveld*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon. Ŝanco por la lingvo



http://esperantaretradio.blogspot.com.

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 1a de majo estis la unua sabato. Venis Roger, Chris, John kaj Ian. Ni legis/diskutis la artikolon de Ian en AE. *Roger Springer*

## Pri Militoj

Mi absolute konsentas kun Marcel (AE258) pri militoj, en kiuj Aŭstralio partoprenis/os: ĉar Aŭstralio bezonis usonan helpon kontraŭ japana invado antaŭ 80 jaroj, niaj politikistoj ankoraŭ kroĉiĝas al tiu alianco. Kaj eĉ Malcolm Fraser, konservativa malvarmilitisto, fine de la vivo atentigis, ke la sola motivo, kiu instigus alian landon ataki Aŭstralion, estas nia partpreno en la mondvasta usona militmaŝinaro. Nia laŭdire iom maldekstra ALP ankoraŭ ne akceptis la saĝon de maljuna Fraser. *Trevor Steele*








Sirio bombita

Ho Ve! Niaj belaj domoj!

Kion fari?

*Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Ĉu Australio nun mortigas homojn en Sirio?

Jan 2021 Roger Springer



Australian jets drop first bombs on Islamic State targets in Syria (news.com.au) Australians for War Powers Reform

## Australian War Powers Reform Bulletin #80 (Angle, ne Esperante)

https://us3.campaign-archive.com/home/ Informoj pri Aŭstraliaj sekretaj militoj, Roger Springer

## Quo Vadis nia Esperanto?

La vivo estas plenplena de malĝojaĵoj, do mi ŝatas skribi por AE feliĉigan alineon aŭ tri. Pro tio mi serĉis esperante pri Esperanto en Vikipedio, sed miaj esperoj ne efektiviĝis.

Verŝajne en 2010 Brazilio enhavis la plej grandan nombron da E-parolantoj; sekvis Francujo, Usono, Germanujo, Rusujo, Pollando kaj Hispanujo. Nenia mencio de Ĉinujo, kie en 1986 mi ĉeestis grandegan UKon.

Oni kalkulis, ke en Decembro 2016 estis 2 milionoj da E-parolantoj en la mondo. Proksimume dek mil parolis la internacian lingvon flue, cent mil povis uzi ĝin aktive, kaj 1 miliono komprenis 'pasive'. Aldonu mil denaskajn aŭ ĉiutagajn parolantojn. (Jes, ankaŭ mi scivolis pri la ceteraj naŭ mil.)

Responde al mia demando, *Kio pri Esperanto en la estonteco?* mi legis, "Esperanto havas potenciale tre brilan futuron. Mi vidas leviĝon de intereso pro haveblaj, perretaj instrumaterialoj, precipe la Duolingo kurso". (Do, reklamo por Duolingo.)

En Decembro 2015 la Kolegio de Parizo anoncis, ke en 2050 estos proksimume 750 milionoj da franclingvaj parolantoj. Pli ol de la angla aŭ de la hispana. Sed, kio pri la ĉinaj kaj la hindaj?

Kion faras la UN por reklami la valoron kaj kreskigi la lernadon de Esperanto?? Kiel forta estas UEA kompare kun en la lasta jarcento?

Mi legis la bele ilustritajn, koncizajn enkondukvortojn fare de Chuck Mays kaj Humphry Tonkin "Esperanto por LIngvaj Justeco kaj Egaleco" *("Esperanto for Linguistic Justice and Equality")* (Augusto 2020). Kaj ĉe la fino, je mia ĉagreno, la vortojn:



"Disreklamacio: La opinioj esprimitaj en ĉi tiu blogo ne necese spegulas la oficialan politikon de Civitanoj por Terglobaj Solvoj (*Citizens for Global Solutions).*

Ho mia kor'. Mi atendas kuraĝigajn vortojn de optimistaj legantoj de "AE". ☹ *Vera Payne.*




**BES ŝerco** Dunganto: Ĉu vi kredas je vivo post la morto?
Dungito: Certe ne! Ekzistas neniu pruvo pri tio.
Dunganto: Nu, estas nun. Post kiam vi frue foriris hieraŭ por iri al la emtombigo de via onklo li venis ĉi tien serĉante vin. Petro Danzer

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***







15 Majo 2021

# Esperanto Por UN

**3ZZZ** La elsendo de la 3a de majo estas dediĉita al la naturo, ĉu la homkaŭzitaj damaĝoj al la naturo aŭ al bestoj , kaj traktas la gravan problemon pri arĥivado



*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 33**



1). 1) Hieraŭ; 2) al; 3) rapide; 4) por; 5) per.
2). Senlime.
3). Ne.

*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***